

41a jaro. Nro 93a. 1a semestre 2014



# VENEZUELA STELO

Organo de Venezuela Esperanto-Asocio

ISSN 1316-0451



**Fotoraportajo: La Laguno de Mucubaji**

**Poemoj de Ana Cristina Bracho kaj Caneo Arguizones**

**Speciala renkontiĝo en Nepalo**

**Infanlibro: Mio, mia filo**



# Enhavtabelo

**Movadaj Noticoj** 3a

**Jacinto Convit García**  
**Ricardo Coutinho** 5a

**Du kursoj pri la lingvo Esperanto kaj Esperantologio en UCV**  
**Johano Negrete** 5a

**Ágnes Waldman, denaska esperantistino**  
**Ricardo Coutinho** 6a

**Filmo: Azul y no tan rosa** 7a

**Infanlibro: Mio, mia filo**  
**Raportas: Ricardo Coutinho** 7a

**Speciala renkontiĝo en Nepalo**  
**Liba Gabalda** 8a

**Ana Cristina Bracho**  
**Thairon Martínez** 10a

**Fotoraportaĵo: La Laguno de Mucubají**  
**Ricardo Coutinho** 15a

**Caneo Arguinzones**  
**Thairon Martínez** 20a

**Directorio de Asociaciones en América** 22

**Esperanto: Movimiento internacional** 23

**Plurlingva Plenluna Deklamado realigita merkrede la 18an de Decembro kiel Zamenhofa Omaĝo**  
**Thairon Martínez** *lasta*



**VENEZUELA STELO**  
Organo de la Venezuela Esperanto-Asocio

**VENEZUELA STELO**  
Apartado postal 47675, Caracas 1041-A.  
Telefonnumero: 58-0212.662.9224  
[www.esperanto-venezuela.org](http://www.esperanto-venezuela.org)  
[venesperanto@cantv.net](mailto:venesperanto@cantv.net)



**AVE**  
Asociación Venezolana de Esperanto  
Venezuela Esperanto-Asocio

**Estraranoj:**

**Prezidanto**  
Ricardo Coutinho.

**Vic-Prezidanto**  
Juan Miranda.

**Ĝenerala Sekretario**  
Thairon Martínez.

**Kasistino**  
Elizabeth Garzón.

**Aldelegito pri Biblioteko**  
José G. Cisneros.

**Aldelegito pri Konferenco kaj Inter-instituciaj Rilatoj**  
Esteban Mosonyi.

**Aldelegito pri Instruo**  
Juan Negrete.

**Grafikisto**  
Ramón Morales Castel.

## ¿Quieres saber más sobre el Esperanto?

El Esperanto es un idioma planificado, creado en 1887 para servir como idioma neutral internacional. Su gramática sencilla facilita su dominio rápido. Su flexibilidad lo convierte en una lengua ideal para la traducción y la creación literaria. Si quieres saber más sobre este idioma fascinante, escribe o dirígete a la Asociación Venezolana de Esperanto.

**Venezuela Stelo** es el órgano difusor oficial de la **Asociación Venezolana de Esperanto**. Esta revista está totalmente escrita en esperanto, conteniendo artículos de interés nacional e internacional.

Para saber más visita: [www.esperanto-venezuela.org](http://www.esperanto-venezuela.org)  
Y también el Directorio en las páginas 22 y 23 de esta revista.

Pri la enhavo de niaj artikoloj repondecas iliaj aŭtoroj. Manke de indiko de la aŭtoro, respondecas la redakcio. Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene republikigitaj por laŭleĝaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Krome, ni ŝatus ricevi leterojn de niaj legantoj, kun taksoj, opinioj, sugestoj kaj kritikoj. Tio ebligus al ni la plibonigadon de la revuo, pri kio ni antaŭdankas la kunlaborantojn.



## Venezuelo ĉeestis en 99-a UK

Kvar ge-venezuelanoj partoprenos en la 99-a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en Bonaero, ĉefurbo de Argentina Respubliko, dum la tagoj 26-a de julio ĝis 2-a de aŭgusto 2014. La libro-tenisto Isaac Santiago kaj sia edzino Andrea Araque, kiuj loĝas en la ŝtato Merido partoprenos kune kun la prezidanto de Venezuela Esperanto-Asocio, Ricardo Coutinho kaj Lenin Ramírez en tiu grava aranĝo. Ni esperas montri venezuelaĵojn kaj nian revuon al ĉiuj partoprenantoj.

Cuatro venezolanos participarán en el 99no Congreso Universal de Esperanto, que se efectuará en la ciudad de Buenos Aires, desde el 26 de julio al 2 de agosto 2014. El contador Isaac Santiago y su esposa Andrea Araque, quienes viven en el Estado Mérida participarán en conjunto con el presidente de la Asociación Venezolana de Esperanto, Ricardo Coutinho y el técnico en computación Lenin Ramírez. Esperanto aprovechar dicha oportunidad para mostrar ciertas representaciones culturales venezolanas y algunas producciones que ha hecho la asociación.



**99ª UNIVERSALA KONGRESO  
de ESPERANTO**

Bonaero, 26 julio - 2 aŭgusto 2014

## Globeto

Reĝisoras Fábio Monteiro, brazila ĵurnalisto, kreis tiun televidkanalon en *Youtube*, ĝi estas freŝa kaj mojosa. Ĝi enhavas diversajn temojn kiel: NASK, Intervuoj al gravaj esperantistoj, TAKE, IJK, esperantista edziĝo.

Es un canal en *Youtube* hecho por el periodista brasileño Fábio Monteiro, en él se presenta entrevista y reportajes de una manera bastante fresca y juvenil en el marco de actividades del mundo esperantista, entre los temas ya presentados tenemos por ejemplo: NASK (Complejo de Curso de verano en Norteamérica), entrevista como la del médico y activista esperantista José Antonio Vergara, TAKE (Congreso Americano de Esperanto), IJK (Congreso Juvenil de Esperanto, hecho por TEJO, organización mundial de jóvenes esperantistas) y la cobertura de un matrimonio de una polaca y un brasileño, ambos esperantistas.



## 47-a Konferenco de ILEI

Ĝi okazos je 19<sup>a</sup> al 25<sup>a</sup> de julio 2014, La malfermo de tiu evento estos en la Leĝa Palaco de Urugvajo. Kie jam de 60 jaroj la UNESKO faris unuan rezolucion favore al Esperanto, kune kun esperantistoj estos deputitoj de UNESKO. Simpozia temo: Lingva Justeco en la praktiko... Post la Konferenco okazos ekskursoj al Punta del Este kaj Kolonio.

Del 19 al 25 de julio se celebrará la 47 Conferencia de ILEI (Liga de Profesores de Esperanto) en el Palacio Legislativo de Uruguay, en conmemoración a los 60 años de la primera resolución a favor del Esperanto. Allí participarán además de esperantista también diputados de UNESCO. El tema de simposio será: Justicia Lingüística en la práctica... después del evento habrá excursiones para Punta del Este y Colonia.



## La 70-a IJK

Brazilo estas lando monde fama pro ĝia tropikeca etoso, pro ĝiaj afablaj enloĝantoj kaj pro ĝia granda diverseco. Ni invitas ĉiujn esperantistojn de la tuta mondo veni malkovri (aŭ remalkovri) nian belan landon pere de nia internacia lingvo.



Ni elektis la urbon Fortalezo pro diversaj kialoj. Unue, ĉar tie loĝas fervora kaj aktiva junularo, kiu interesiĝis pri ĝia organizado. Due, ĉar kiam someras en la norda duonsfero de la mondo, vintras en la suda... Bonŝance, vintro en Fortalezo ne vere ekzistas kaj temperaturoj neniam iras sub 25°C (75°F), kaj ne pluvas dum julio kaj aŭgusto. Trie, Nordorienta regiono de Brazilo, kie troviĝas Fortalezo, estas ofte forgesita de la sudbrazilanoj, kaj ni volis doni al Nordoriento ŝancon gastigi tiun mirindan kongreson. Kvare, por profiti la valoran sperton de CEA —Cearaa Esperanto Asocio, kiu organizis UK 2002. Por scii pli pri la aventuroj de la organiza teamo, tralegu la paĝon pri novaĵoj de tiu ĉi retejo.

IJK okazos inter la Futbala Mondpokalo, kiu okazos ankaŭ en Brazilo, kaj la 99a UK, en Bonaero. Tiel, eksterlandanoj kiuj venos por la mondpokalo povos profiti kaj resti por la IJK, dum tiuj, kiuj venos por UK povos profiti por ankaŭ IJK-umi. Fortalezo estas meze de la vojo inter Eŭropo aŭ Nordameriko kaj Argentino. Finfine, tiuj, kiuj emos resti en Brazilo dum pli da tempo povos profiti niajn antaŭ kaj post-kongresajn ekskursojn, kiuj kunportos la partoprenantojn al belegaj lokoj, inter ili kelkaj el la plej belaj plaĝoj de Brazilo.

Fonto: [www.ijk.brazilo.net/](http://www.ijk.brazilo.net/)



## Biblioteka apogo Bachrich ekfunkcias

Danke al malavara donaco de la gefiloj de Johano kaj Maria Bachrich, UEA povis denove starigi fondaĵon por subteni la pliriĉigon de la kolektoj de Esperanto-bibliotekoj. Ekde 1997 funkciis Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen, kies kapitalo elĉerpiĝis en 2011. Lastatempe la gefiloj de ges-roj Bachrich donacis al UEA 20.000 USD (ĉ. 14.500 EUR) kiel kapitalon de la Biblioteka Apogo Honore al la Geedzoj Maria kaj Johano Bachrich. La estraro de UEA akceptis kun granda dankemo la donacon, kiu laŭ la interkonsento kun la gefiloj Bachrich ebligis subvenciojn dum dek jaroj.

Johano (Juan) Bachrich estis eminenta venezuela esperantisto, kiu naskiĝis en 1921 en Vieno kaj lernis Esperanton en 1938 en Zemun (Jugoslavio). Ekde 1948 li vivis en Venezuelo. Li estis longe la motoro de Venezuela Esperanto-Asocio, kiun li reprezentis en la Komitato de UEA ekde 1978 ĝis sia forpaso en 2005. Li estis ankaŭ mecenato de la

Movado, kontribuante i.a. al la realigo de la instruaj videoprojektoj "Mazi en Gondolando" kaj "Esperanto: Pasporto al la tuta mondo". En 2000 li fariĝis honora membro de UEA. Lia edzino Maria, ankaŭ esperantisto, naskiĝis en 1936 kaj forpasis en 2011.

Biblioteka Apogo Bachrich disdonas subvenciojn unuafoje ĉi-jare. Ili estas celitaj al Esperanto-bibliotekoj, kiuj ne estas financataj de ŝtata, urba aŭ alia ne-movada instanco. Diference de la iama Apogo Thorsen, kiu subvenciis nur akiron de libroj, la subvencioj estas uzablaj ankaŭ por aliaj varoj aĉetablaj ĉe la Libroservo de UEA.

Por peti subvencion, oni sendu priskribon pri la biblioteko kaj liston de dezirataj libroj aŭ aliaj varoj, ordigitaj laŭ prefero. La petoj atingu la Centran Oficejon de UEA ĝis la 30-a de aŭgusto papere (Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando) aŭ rete al [direktoro@co.uea.org](mailto:direktoro@co.uea.org).





## Jacinto Convit García

Ricardo Coutinho

Jacinto Convit García (Karakaso, naskiĝis je 11<sup>a</sup> de septembro 1913- mortis je 12<sup>a</sup> de majo 2014) estis venezuela kuracisto kaj sciencisto, konata pro vakcino kontraŭ la lepro kaj liaj esploroj kontraŭ diversaj kanceraj. Li ricevis kelkajn premiojn kiel Premio Príncipe de Asturias kiel Scienca kaj Teknika Esplorado je 1987 kaj estis kandidatigita je Nobelpremio je 1988.

Lia patrino estis la venezuelanino Flora Marrero kaj la katalana elmigrinto Francisco Convit, li loĝis en La Pastora, la plej malnova kvartalo de Karakaso.

Li lernis en la bazlernejo Andrés Bello, tie la eks-prezidanto Rómulo Gallegos instruis al li matematikon kaj filozofion.

Je la jaro 1932, li eniris al la Lernejo de Medicino de la Centra Universitato de Venezuelo kiel iĝis Doktoro je Medicina Scienco en 1938.

En 1937, la kuracisto Martín Vegas, konata kiel pionira esploristo pri lepro invitis al Convit helpi en la domo Lazareto de Cabo Blanco, en la ŝtato Vargas, kie loĝis lepruloj. En 1990, Convit skribis ke dum sia laboro en Cabo Blanco li riĉiĝis spirite kaj profesie:

"Tie mi lernis flegi al malsanuloj laborante kiel kuracisto, juĝisto, dentisto kaj konsilanto, tiel mia kono riĉiĝis je tiu malsano kaj mi lernis pri la homaj aspektoj de la malsanuloj".



Tiam la lepruloj estis forte diskrimiciitaj, li postulis pli bonaj traktadoj al malsanuloj de la dungitoj de la malsanulejo.

Dum kelkaj esploradoj li trovis ke la oleo de chaŭlmoogra povas sanigi la leprulojn.

Li kreis la Instituto pri Haŭtoesploroj, kiu poste estis nomumita Instituto pro Biomedicino de Karakaso, Convit estis direktoro dum la jaro 1972 ĝis 1973.

Postmorte li ricevis la premion "Orden Libertadores de Venezuelo" laŭ dekreto de la venezuela prezidanto Nicolás Maduro Moros.



## En la Universitato Centra de Venezuelo du kursojn pri la lingvo Esperanto kaj Esperantologio oni instruis

Johano Negrete

En la *Universidad Central de Venezuela* oni trovis, ke dum la jaro 2014 du kursojn rilate al la internacia lingvo Esperanto oni ofertis kaj instruis. Unu el ili ankoraŭ estas daŭriganta ĝis la venonta novembro en la *Escuela de Idiomas Modernos* (Lernejo de Modernaj Lingvoj). La kurso estas nedeviga studobjekto kontraŭ 3 poentoj, daŭras 2 semestrojn kaj sia titolo: "Internacia Lingvo Esperanto". Registriĝis lastjane 15 studentoj, sed nur 10 daŭrigas. Ĝi estas kurso pri la baza lernado de la lingvo.

La dua kurso en la *Escuela de Filosofía* (Lernejo de Filozofio) estis Seminario pri Interligvistiko kaj Esperantologio, kontraŭ 3 poentoj. Registriĝis 5 studentoj. Ĝi daŭris 1 semestron kaj ĵuse finiĝis. La celo de la seminario estis disvolvi la ideon de racia planita lingvo per prezentado de pluraj historiaj projektoj kun emfazo en la lingvo Esperanto kaj la disciplino Esperantologio. Aprobis 2 studentoj

dum 3 ne prezentis la finan ekzamenon.

Tamen oni devas raporti, ke la ĉi-jara akademika periodo bedaŭrinde estas plilongigita de aŭtoritatuloj, ĉar dum tri okazoj disturboj ene de nia universitato stimulis al la akademika estraro interrompi klasojn kaj aliajn universitatajn agadojn. Tio kun la pretendo, ke la politika situacio de la lando ne permesis la normalecon de klasoj kaj reserĉoj. Male la fakto estas, ke de entute 65 landaj universitatoj (popolaj kaj privataj), nur 16 universitatoj interrompis kursojn kun politikaj diskursoj kontraŭ la registaro, dum la ceteraj neniam perdis klasojn, ekzamenojn nek ceremoniojn de diplomiĝo. Do, oni opinias, ke en Venezuelo ekzistas tutplena demokratio kaj la rajto manifesti estas tute asekurata, kaj sekve ne necesas interrompi klasojn tiom longe por protesti.

Johano Negrete

Delegito pri Instruado - VEA.



## Ágnes Waldman, denaska esperantistino

### Ricardo Coutinho

Ŝi estis filino de Elek Tolnai kaj Boris Rona, elstaraj esperantistoj de Hungario. Mi konis ŝin dum iam estarkunsido en Venezuela Esperanto-Asocio dum la jaro 2001, ŝi diris al mi ke ŝia patro estis murdita en nazia koncentrejo, dum lia restado en tiu malliberejo li instruis esperanton. Komprenoble, ŝi jam estis blankhara kaj agrabla maljunulino. Serĉante per journaloj kaj interreto oni trovas ke ŝi naskiĝis je 19<sup>a</sup> de majo 1925 en Budapeŝto, Hungario. Ekde la infaneco ŝi tre ŝatis ludi pianon, kaj ŝi lernis ĝin en la Akademio Liszt Franz de Muziko, kie gravaj pianistoj kiel Bartók, Kodály y Dohnányi instruis al ŝi kaj lernis kune kun la fama Tibor Tibor Szatmari, ŝi lernis ĉambro-muzikon. La milito faris ke ŝia familio forlasi Hungarion.

Pro muziko ŝi elmigris al Venezuelo post la dua Mondmilito, ĉar kelkaj amikaj muzikistoj invitis ŝi ludi kun ilin. Kaj dankon al la muziko, ŝi konis ontan edzon, Jules Waldman, kiu estis propietulo de pianovendisto en Karakaso kaj post kelkaj jaroj fondinto de The Darly Journal, karakasa ĵurnalo en la angla lingvo.

Ŝi edziniĝis je 1949 kaj havis du gefilojn, Kathy je 1951 kaj Ken je 1952. Agnes instruis pianoludadon dum kelkaj jaroj, poste la pianludado estis nur ŝatokupo anstataŭ laboro. Malgraŭ tio la muziko daŭris en ŝia hejmo.

Malgraŭ la malriĉaj dokumentaj fontoj, oni povas atesti ke ekde ĉiam ŝi partoprenis en nia movado, ŝi estis membro de Fondaĵo Esperanto (Fundaesperanto, venezuela kultura fondaĵo) kaj membro de la Venezuela Esperanto-Asocio.

Agnes dediĉis sian tempon gvarti siajn gefilojn kaj la flegado de sia patrino. Ŝi vojaĝis multe, revenis al Hungario, unufoje post sia foriro je 1962. Ŝi aĉetis tri donacovendejojn en gastigejoj en Karakaso.

Jules mortis je 1990 kaj ŝi translokiĝis al apartamento en Karakaso. Dum 2014 ŝi translokiĝis al Usono kun la celo loĝi kune kun sia filo. Ŝi forpasis dum marto 2014.

Mi legis tiun ĉi artikolo, jen ĝi:

Ágnes Tonai, eta esperantistino

Lidja Zamenhof, tradukis Zofia Banet Fornalowa

Revuo "Femina", jaro 8, printempo 2012, n-ro 29, paĝo 24<sup>a</sup>.

Elprenita de Heroldo de Esperanto.

Ágnes Tolnai estas eta. Aspektas kiel kvarjarulino, sed ŝi estas jam kvinjara fraŭlino. Ŝi loĝas en Budapeŝto, Hungario.

Inter la amikoj ŝi estas konata kiel eta knabineto kiu ne kutimas timi fremdajn homojn, sed volante proksimiĝas al ĉiu, rakontas pri pupoj, hundeto, kanario. Kaj, kvankam eta, Ágnes, samkiel ĉiuj aliaj infanoj kaj plenkreskuloj, havas en buŝo nur unu langeton, tamen parolas per du lingvoj. Kun vartistino kaj samaĝuloj ŝi parolas hungare, sed patro kaj patrino plej volante parolas kun ŝi esperante.. kaj eta Ágnes konas esperanton, lingvon internacian, same bone, kiel la gepatran, hungaran.

Ŝia amikino Ilonka havas francan guvernistinon, kiu instruas al ŝi la francan, sed Ágnes diras, ke la franca neniel egalas al esperanto, ĉar la franca estas malfacila kaj esperanto estas facila kaj pli facile... eliras el la buŝo. (La



plenkreskuloj dirus, ke la esperanta prononco estas pli facila ol la franca).

Unufoje Ágnes revenis el la ĝardeno plorante: Ilonka ofendiĝis je ŝi ne sciate kial kaj dum la tuta tempo interparolis kun sia guvernistino nur france, kaj Ágnes ne povis enmiksiĝi al interparolo kaj devis silente sidi. Atendu- konsilis ŝin la patrino –somere alvojaĝos Budapeŝton multe da homoj, kiuj parolas esperante. Vi vidos, kiel agrable estos kun ili paroli. Kaj efektive somere okazis en Budapeŝto Esperanto-kongreso.

La gepatroj de Ágnes havis amason de esperantistaj kontaktoj kaj al ĉiuj prezentis sian etan filinon. Estis diversaj homoj el diversaj landoj. Estis eĉ ĉinoj kaj japanoj. Ágnes mem miris, kiel facile estas al ili ĉiuj esperante interkompreniĝi, kaj korligiĝis al ĉiu, kaj ĉiuj korligiĝis al ŝi. Eta Ágnes, kvinjara esperantistino, estas amata kaj admirata, oni povas diri... heroino de la tuta kongreso; partoprenas kunvenojn, artajn prezentojn, ekskursas, estas aplaŭdata por esperantaj kantoj.

La kongreso daŭris nur semajnon. Ágnes deziregus, ke ĝi daŭru tutan jaron. Estis al ŝi malĝoje kiam la gastoj ekforveturis, sed la patrino diris, ke se ŝi estos ĝentila sekvontjare ŝi veturos eksterlanden kaj denove partoprenos Esperanto-kongreson.

Finfine finiĝis. La lastaj agadoj forveturis. Forveturis ankaŭ amikino de patrino el Londono.

Denove silente kaj kviete... Nur el la infanĉambro aŭdiĝas voĉoj. Jen Ágnes klarigas al Ilonka, ke ŝi nepre devas lerni Esperanton kaj komencas kun ŝi la unuan lecionon.

Tra fermita pordo la patrino aŭdas la voĉon de sia filineto:

Apa- patro, anya- patrino.

Agnes Walman, pionera esperantista en Venezuela.

Agnes Walman: fue pianista y esperantista húngara. Su padre, Elek Tonai, muere en un campo de concentración en la Segunda Guerra Mundial. Nace en Budapest el 19 de mayo de 1925. Desde su infancia estudió piano, asistiendo a la Academia Liszt Franz de Música, donde importantes pianistas como Bartók, Kodály y Dohnányi fueron sus maestros, además estudió junto con el también famoso Tibor Tibor Szatmari, allí ella estudió música de cámara. La





guerra la hizo huir de su país.

Gracias a la música, ella emigró a Venezuela después de la Segunda Guerra Mundial, a raíz que algunos músicos amigos invitaron tocar con ellos en este país. Allí conoció a su futuro esposo, Jules Waldman, propietario de una tienda de pianos. Posteriormente Waldman sería fundador del periódico en inglés de Caracas The Darly Journal.

Ella se casó el 1949 y tuvo dos hijos, Kathy para el 1951 y Ken para el 1952. Agnes daba clases de piano para estudiantes avanzados, y posteriormente ésta actividad se convirtió en sólo un pasatiempo, a pesar de que nunca faltó la música en su hogar.

Agnes Walman fue miembro de la Asociación

Venezolana de Esperanto, participó en varias asambleas, congresos y otras actividades.

Ella compró tres tiendas de regalos en hoteles de Caracas.

Jules muere para 1990 y ella se traslada a un apartamento en Caracas. Posteriormente se muda a Estados Unidos para vivir con su hijo. Muere en marzo de 2014.

Kelkaj datenoj estis elprenitaj de:

Kroniko de Esperanto de Liba kaj Floreal Gabalda

[www.millerfuneralhome.net/current\\_funeral\\_services/AgnesWaldman.asp](http://www.millerfuneralhome.net/current_funeral_services/AgnesWaldman.asp)



## Filmo: Azul y no tan rosa


*Azul y no tan rosa* estas venezuela-hispana filmo lanĉita je novembro 2013. Ĝi estas la plej fama filmo de la aktoro kaj reĝisoro Miguel Ferrari. Ĝi estas la unua venezuela filmo premiita de Premio Goya kiel la plej bona hispanamerika filmo, de 2013. La filmo temas pri samseksamo, transseksemo, perforto kontraŭ seksdiverseco.

### Priskribo

Diego, estas sukcesa fotisto de Karakaso, decidis oficialigi sian amrilaton kun Fabrizio per loĝi kune, sed tute hazarde li devis varti sian filon Armando, kiu loĝas en Hispanio, kaj Diego jam de longe ne vizitas lin. La knabo alvenas al lia vivo kun valizo ŝarĝita el riproĉoj. Tiel al Diego estos tre malfacile plibonigi sian rilaton kun sia filo. Tiam, kontraŭeĵuloj forte batas al Fabrizio ĝis komato.

### Aktoroj

En *Azul y no tan rosa* aktoras Guillermo García kiel Diego, Hilda Abrahamz kiel la transseksulo Delirio, la juna hispana aktoro Ignacio Montes kiel la filo de Diego, krom al ili partoprenas famaj venezuelaj aktoroj de televidproduktaĵoj kaj teatro.



## Infanlibro: Mio, mia filo Ricardo Coutinho

La infanlibro Mio, mia filo estis verkita de Astrid Lindgren, sveda verkistino, kiu naskiĝis en Vimmerby. Kiel infano ŝi ege ŝatis legi, ĉefe infanlibrojn kun knabino kiel protagonistino. Post la lerneja tempo ŝi transloĝiĝis al Stokholmo, kie ŝi edziniĝis kaj naskis du infanojn. Sian unuan rakonton ŝi verkis 1944. Mondfamon ŝi gajnis en 1945 per sia infanlibro Pipi Ŝtrumpolonga, kiun ŝi skribis kiel donacon okaze de la 10<sup>a</sup> naskiĝotago de sia filino.

Tiu rakonto estis tradukita el la sveda de Leif Nordenstorm por la Eldona Societo Esperanto, en la jaro 2006. Krom tiu verko, aperis en nia lingvo la jenaj verkoj: La fratoj Leonkoro, Pipi Ŝtrumpolonga, Emilo de Smolando kaj Ronjo, rabista filino.

Jen la verko: Boĉjo loĝis kun geedzoj kiuj ne ŝatis varti lin, tute hazarde tiu infano trovis ke sia patro estas reĝo de la Lando Fora, kaj malgraŭ lia vivo estas feliĉa en tiu reĝolando, ekzistas najbara lando kie reĝas la kruela kalivaro Ĥato.

El libro infantil Mio, mia filo (Mio, min Mio) es obra de la escritora sueca Astrid Lindgren, quien nació en Vimmerby. Cuando niña le gusta mucho leer, especialmente cuentos donde una muchacha era su protagonista. Después de sus estudios se muda a Stocolmo, donde se casa y tiene dos hijos. Su primer cuento apareció en 1944. Ella ganó fama mundial en 1945 con su cuento Pipi Mediaslargas, que escribió para su hija al cumplir diez años.

Este cuento es traducido del sueco al esperanto por Leif Nordenstorm y editado por Eldona Societo Esperanto, en el año 2006. Además de dicha obra también aparece en esperanto las siguientes: Los Hermanos Corazón de León, Pipi Mediaslargas, Emilo de Somlando y Ronjo, hija ladrona.

Una pequeña reseña: Boĉjo vive con una pareja que no le agrada cuidarlo, pero inesperadamente este niño descubre que su padre es el rey de Lando Fora, y a pesar de ser feliz en ese reino, existe un país vecino donde vive un cruel caballero llamado Ĥato.



## Speciala renkontiĝo en Nepalo

Raportas: Liba Gabalda

Nepalaj esperantistoj organizis tre sukcesan “Specialan Renkontiĝon” de la 6-a ĝis la 17-a de marto 2014. Partoprenis ĝin ne nur nepalanoj, sed ankaŭ 17 gastoj el Ĉinio kaj eŭropanoj el Belgio, Bulgario, Danio, Francio, Pollando kaj Svislando. La aventuro komenciĝis en la ĉefurbo Katmanduo. La akcepto estis varma, laŭ nepala kutimo oni tuj post la alveno ornamis nin per florkolĉenoj. Post la enhoteliĝo en la komerca kvartalo Thamel en hotelo Marshyangdi ni iom promenis akompane de nepalaj esperantistoj tra urbaj stratoj plenaj je turistoj.

La sekvan tagon ni vizitis lokajn vidindaĵojn: hindan templon Pashupatinath kaj budhan stupaon Boudhanath. En la proksima urbo Patan ni promenis kaj admiris artaĵojn faritajn el ligno. Elstaras tie la Kriŝna templo. Vespere okazis interkonatiĝo kun nepalaj samideanoj. La prezidantino de la Nepala Esperanto-Asocio (NEspA) Indu Devi Thapaliya, Mukunda Raj Pathik kaj aliaj membroj post solenaj paroladoj malfermis la eventon. Ĉeestis ankaŭ reprezentantoj el la orienta parto de Nepalo familio Pokhrel, kies ĉarma 13-jara filo bonege parolis Esperanton.

Sabate la 8-an de marto ni vojaĝis al la nacia parko Chitwan - Koro de ĝangalo. Unue ni pirogumis kaj poste ni vizitis elefantfarmon kaj rajdis elefantojn. Ni estis bonŝancaj vidi deproksime rinocerojn kaj aliajn bestojn. En la parko troviĝas simioj, cervoj, aproj, multaj specoj de birdoj, krokodiloj kaj laŭdire eĉ tigroj, kiujn ni feliĉe ne renkontis. Impresis grandegaj termitejoj. Post la reveno okazis kelkaj prelegoj: pri la Esperanto-instruado laŭ la metodo BEK rakontis Peter Wraae el Danio. Arie Bouman el Belgio prezentis bildojn el Islando kaj parolis pri siaj spertoj dum la 98-a UK en Rejkjaviko. La sekvan vesperon ni spektis tre belan folkloran programon de popolaj indiĝenaj dancoj.

En la urbo Lumbini ni vizitis la naskiĝlokon de Budho. Ni admiris Maya Devi templon kaj ankaŭ aliajn vidindaĵojn. En Palpa ni tranoktis. En la urbo Pokhara renkontis nin loka esperantisto Himalal Parajuli kaj pretigis por ni la jenan programon: matene ni per malgranda boato navigis sur la Phewa lago ĝis insuleto, kie troviĝas hinda Barahi templo. Sinsekve ni vizitis Binhdabasini templon, Mahendra kavernon

kaj Seti gorĝon. Post la tagmanĝo ni vizitis la Internacian Himalajan Muzeon kaj poste ni ekskursis al la pagodo de Paco. Fine de la tago ni ankoraŭ sukcesis vidi Davis akvofalon. Vespere ni povis ĝui hotelan dancprogramon. Sekvan matenon ni ellitiĝis tre frue kaj veturis al la montara vilaĝeto Sarangkot spekti sunleviĝon kaj vidi la Annapurna montaron. Poste ni havis liberan tempon por promenado aŭ aĉetado. Posttagmeze okazis serio da prelegoj. Peter el Danio prelegis pri la dana filozofo “Martinus“, Eduard Kusters el Belgio pri la “Belga kompromiso”, Pierre Bouvier el Francio klarigis, kial Esperanto estas pli simpla kaj efika ol baza angla lingvo. Barbara Pochanke el Svislando prezentis sian Esperanto-karieron kaj ĉe la fino Roman Dobrzynski el Pollando montris ege interesan filmon pri Oomoto, kiun li mem reĝisoris kaj produktis. Post solenaj paroladoj la vespero finiĝis per komuna vespermanĝo.

Sabate la 15-an de marto ni forveturis al Katmanduo kaj vespere ni ĉiuj estis invititaj al solena geedziĝa festo. S-ro Parashar Rijl edzigis sian filon. Ni ĝuis belan festadon kun viva muziko kaj bongusta manĝo. Dimanĉe en Nepalo okazis festo de koloroj - Holi. Dum ĝi homoj, sed ĉefe gejunuloj, kolorigas siajn kaj aliulajn vizaĝojn kaj vestaĵojn. Ankaŭ ni ne eskapis tiun eventon kaj estante farbitaj ni promenis inter homamaso. Matene ni vizitis religian ensemblon Swayambhunath, kiu troviĝas sur arbokovrita monteto. Ĝi estas konata kiel templo de simioj, kaj vere ili kuris ĉie samkiel en Pashupatinath. Ĉi-foje la tagmanĝon pretigis volontuloj en la sidejo de NEspA. Ni ĝoje babilis, kantis kaj dancis. Ankaŭ dum la adiaŭa vespero ni bone amuziĝis. Nepalanoj donacis al ĉiu tipan ĉapon topi, ŝalon kaj monujon. Maja Gorova el Bulgario prezentis sian landon kaj ĝian kulturon. Ilse Jacques el Belgio dankis al ĉiuj pro la bela renkontiĝo, kiun ŝi povis preskaŭ tute partopreni malgraŭ sia paŝproblemo.

La Speciala Renkontiĝo 2014 sub la gvido de Bharat K. Ghimire estis tre sukcesa, ĉiuj estis ravitaj. Ni kore dankas al la organizantoj de tiu unika evento kaj gratulas ilin pro la iniciato organizi tiun-ĉi specan aranĝon. Mi esperas, ke la movado en Nepalo daŭre floros kaj plifortiĝos. Sukceson al vi!





# Speciala renkontiĝo en Nepalo Raportas: Liba Gabalda



SPECIALA RENKONTIĜO DE ESPERANTO 2014  
EN NEPALO  
06-A ~ 17-A MARTO 2014  
NEPALA ESPERANTO-ASOCIO, NEPALO



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda

**Ana Cristina Bracho****Tradukis: Thairon Martínez**

Ana Cristina Bracho

Poetisa venezolana / Venezuela poetistino

(el la libro "Versos Incómodos"; Eldona Fondaĵo "El Perro y la Rana"; 2013)

(del libro "Versos Incómodos"; Fundación Editorial "El Perro y la Rana"; 2013)

**Español**

I

Aclaro. Porque con la claridad no se traiciona:  
Una mujer de voz potente vive en mí.

La anormalidad de mi poesía te saluda,  
La inconstante norma que rima mis versos  
La impredecible temática que me regale el día,  
La hoja doblada en su ruinoso afán,  
La jefa que grita hasta ahogar aún más,  
La pulpería y el gallinero de los tribunales,  
El dolor que insulta mis talones,  
Los minutos que sobran entre subir y bajar.

En esta vida tan llena de cosas vacías,  
